

# La 71-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI)

Oldřich Arnošt Fischer

Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 16-an de novembro 2022

| | |
|---|---|
| Romkatolika preĝejo en Domaszék.<br> | La 71-a kongreso de KELI okazis en Eklezia Kleriga Centro de hungara vilaĝo Domaszék, proksime de urbo Szeged (16 – 23 julio 2022). |
| Kapelo en Eklezia Kleriga Centro en Domaszék.<br> | En la kongreso partoprenis esperantistoj el Ĉeĥa Respubliko, Francio, Hungario, Pollando, Rumanio, Slovakio, Svedio kaj Svisio. |
| Philippe Cousson, prezidanto de KELI.<br> | Temo de la kongreso estis: **„Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili. Agoj 15, 9“** . Pri tio temis enkonduka prelego de Philippe Cousson. Kelkfoje ni pri la temo diskutis. |

| | |
|---|---|
| Pavol Petrík prelegas pri Mikuláš Lexmann.<br> | **Mikuláš Jozef Lexmann** (1899 – 1952) estis dominikana pastro, abato, esperantisto, piloto, aŭtomobilisto kaj martiro.<br>Dum la dua mondmilito li savis vivojn de hebreoj, kiujn kaŝis en kripto en Košice.<br>Tiam la hebreojn serĉis hungaraj faŝistoj el Partio de Sagaj Krucoj, kiun gvidis Ferenc Szálasi (1897 – 1946).<br>En aprilo 1950 komunistaj policanoj en Ĉeĥoslovakio faris tutŝtatan Agadon K, dum kiu ili neniigis 219 monaĥejojn kaj malliberigis 2 376 monaĥojn.<br>Pastro Lexmann estis devigita labori en malbonaj kondiĉoj kaj mortis kaŭze de cerba atako. |
| Ágnes Ráczkevy-Eötvös: Atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj.<br>Esperantlingva kaj ĉeĥlingva versioj. Eldonis KAVA-PECH.<br> | Dum la kongreso oni prezentis libron de Ágnes Ráczkevy-Eötvös pri atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj. |
| Elżbieta Karczewska prelegas pri poeto Jeroŝenko.<br> | **Vasilij Jakovleviĉ Jeroŝenko** (1889 – 1952) estis ukraina verkisto, poeto, esperantisto, vojaĝanto. Kiam li estis 4-jara, ortodoksa popo lin ŝprucigis per malpura sankta akvo, kaj knabo blindiĝis. Jeroŝenko ofte vojaĝis, studis orientajn lingvojn kaj instruis blindulojn.<br>Li verkis esperantligve, japane, ĉine.<br>Post lia morto liaj parencoj bruligis lian arĥivon. |

Ágnes Ráczkevy-Eötvös.



El prelego de Ágnes Ráczkevy-Eötvös.





**Dietrich Bonhoeffer** (1906 – 1945) estis germana evangelika teologo, filozofo kaj batalanto kontraŭ naziismo.

**Albert Schweitzer** (1865 – 1965) estis franca nekatolika teologo, kuracisto, misiisto, filozofo, etiko, muizikologo kaj Nobel-premiito, kiu laboris en Afriko.

**Jean Henri Dunnant** (1828 – 1910) estis svisia entreprenanto, humanisto, kunfondinto de Ruĝa Kruco kaj iniciatinto de Ĝenevaj Kontraktoj. Li estis la unua Nobel-premiito pro paco (1901).

Bengt Olof Åradsson prezentas libron pri Pipi Ŝtrumpolonga.




Bengt Olof Åradsson estas ĉefredaktoro de ĵurnalo Dia Regno. Prelegoj:
**Ni kaj ili,**
**Sep novaj mortomeritaj pekoj,**
kaj pri esperanto (**Iom lingve**).


Mi prelegis pri historio de Ukrainio.

Lacerto mura (*Lacerta muralis*).



Lacerto mura (*Lacerta muralis*) en Ĉeĥa Republiko estas rara (malgranda populacio estas konata el Štramberk).
Sur muro de unu konstruaĵo en Domaszék mi trovis junan ekzempleron de tiu ĉi lacerta specio.

| | |
|---|---|
| **Akrido hungara (*Acrida ungarica*)**<br> | Akrido hungara (*Acrida ungarica*) similas al neniu alia konata akrida specio. En Ĉeĥa Respubliko ĝi ne troviĝas (en pasinteco malgranda populacio en Regiono Bzenec estis alportita el Balkano kaj ne apartenis al origina faŭno de ĈR).<br>En Domaszék mi trovis du ekzemplerojn. |
| **Muzikisto Bálint Bagy, estro de muzika grupo Csángálló.**<br> | **Ágnes Ráczkevy-Eotvös kaj Bálint Bagi.**<br> |
| **Grupo de popolaj dancistoj.**<br> | Dum kulturaj vesperoj ni konatiĝis kun hungaraj popolaj muziko kaj dancoj. |

<table>
<tr><td>Sinagogo en Szeged.<br> </td><td rowspan="2">Sinagogo en Szeged estas granda kaj belega.</td></tr>
<tr><td>Sinagogo en Szeged.<br> </td></tr>
<tr><td>Apud rivero Tisza.<br></td><td>Vetero estis bela, sed varma,...</td></tr>
</table>

| | |
|---|---|
| Rivero Tisza.  | ...tial ni ĝuis navigadon sur rivero Tisza. |
| Efemero.  | Efemeroj (hungare: *tiszavirág*) estas flugantaj insektoj, kies larvoj longtempe evoluas en akvo. Baldaŭ post kopulacio la efemeroj pereas. |
| *Egretta garzetta*  | Ardeo arĝenta. Mi ĝin fotis de sur ŝipo. |

| | |
|---|---|
| **Romkatolika katedralo.**    | La katedralo havas hungaran nomon *Szegedi Dóm*. |
| **„Al la 85-a datreveno de Ukrainia malsatego , kiun kaŭzis registaro de sovetoj en la jaroj 1932 – 1933. Por eterna memoro de milionoj da senkulpaj viktimoj de genocido de ukraina nacio."**   | Malantaŭ la katedralo ukrainoj rememoras malsategon (1932 – 1933). |
| **Subĉiela Historia Muzeo en Ópusztaszer.**   | La 20-an de julio ni faris tuttagan ekskurson en Subĉiela Historia Muzeo en Ópusztaszer. |


<table>
<tr><td>**Masklo de *Orthetrum cancellatum*.**<br><br></td><td rowspan="2">Apud fiŝlageto mi fotis libelojn.</td></tr>
<tr><td>**Femalo de *Anax imperator* metas ovojn.**<br></td></tr>
<tr><td>**Katino portas mikroton.**<br></td><td>Patrino portas predon al siaj katidoj.</td></tr>
<tr><td>**Venta muelilo.**<br></td><td>Interesa konstruaĵo.</td></tr>
</table>

| | |
|---|---|
| **Tagmanĝo.**<br> | Je la 13-a horo ni tagmanĝis. |
| **En la jaro 895 princo Arpád gvidis hungarojn en centran Eŭropon.**<br> | Statuo de hungara princo Árpád (ĉ. 845 – 907) en historia muzeo Rotunda en Ópusztaszer. |
| **En muzeo.**<br> | En supra parto de la muzeo Rotunda ni rigardis grandegan (1 800 $m^2$) panoraman bildon pri alveno de hungaroj en centran Eŭropon (986). En la jaroj 1893 – 1895 pentristo Árpád Festy (1856 – 1914) kaj liaj kunlaborantoj desegnis tiun bildon. |

| | |
|---|---|
| **Polyphylla fulo.**<br> | Majskarabo *Polyphylla fulo* bezonas por sia evoluo malpezan, sablan teron. Ĝiaj larvoj voras radikojn de plantoj. En Domaszék mi trovis nur du kadavrojn de tiuj belaj skaraboj (partoj de antenoj kaj piedoj mankas). |
| **Ruth van Puijenbroek informas pri programo.**<br> | Adiaŭa vespero. Iu ion scias, iu povas amuzigi kolegojn. |
| **Geedzoj Bożena kaj Marian Kocyk.**<br> | |

<table>
<tr>
<td>„Faraonoj“ Pavel Polnický (lin pakas Antal Pesti) kaj André Åradsson (lin pakas Barbara Lipska).<br> </td>
<td rowspan="2">Adiaŭa vespero. Konkurso, kiu pli bone pakos „mumion de faraono“.</td>
</tr>
<tr>
<td>Barbara Lipska kaj „faraono“ André Åradsson.<br></td>
</tr>
<tr>
<td>Elżbieta Karczewska informas komitatanojn pri venonta kongreso (Pollando, Bjalistoko, 5 – 12 aŭgusto 2023).<br></td>
<td>La kongreso en Domaszék al mi plaĉis, ĉar ĝi estis bonege organizita kaj mi eksciis pli multe pri kredo kaj Hungario.<br><br>Kiam ni denove renkontiĝos?</td>
</tr>
</table>

<table>
<tr>
<td>


</td>
<td>La 72-a Kristana Kongreso de KELI okazos en Pollando (Bjalistoko, 5 – 12 aŭgusto 2023).</td>
</tr>
</table>

**Rekomendita literaturo**


ANONIMO 2022: Ópusztaszer. Látogatókalauz. Visitor´s guide. Führer für die Besucher. 1-a eld., Ópusztaszer, Ópusztaszeri Nemzeti Történeti Emlékpark Közhasznú Nonprofit Kft., 10 paĝoj.

ANONIMO 2022: Szegedi dóm. 1-a eld., Szeged, Szegedi Dóm Látogatóközpont, 8 paĝoj.

BALÁSZ, P, IVÁNYI, A., VADÁSZ, S. & SZALAI, G. 2022: Szeged. Sights. 1-a eld., Szeged, Szegedi Dóm Látogatóközpont, 8 paĝoj.

COUSSON, P. 2022: „Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili". Enkonduka prelego dum la kongreso en Domaszék, julio 2022. Dia Regno, 4: 75-79.

FISCHER, O. 2022: Ni memoras Kristanan Kongreson en Legnica, kiu okazis 7 – 14 aŭgusto 2021. Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno. Dia Regno, 1: 12-13.

FISCHER, O. A. 2022: Historio de Ukrainio. Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, majo 2022. Dia Regno, 4: 83-90.

KONYHÁS, I. ???: Ópusztaszer. Történelem és természet. History and Nature. Geschichte und Natur. ???, Debrecen, Tóth Könyvkereskedés és Kiadó Kft., 71 paĝoj. ISBN 978-963-596-545-8.

PINTÉR, Z., CSABAI, I. & ILLYÉS, C. 2011: A történelmi Magyarország szépségei. Bewundernswertes in historischen Ungarn. The beauties of historic Hungary. 1-a eld., Kisújszállás, Pannon-Literatúra Kft., Kiadja a Pannon Literatúra Kft., 192 paĝoj.

POLNICKÝ, P. 2022: Helpo al fuĝintoj organizita en Poděbrady. Dia Regno, 2: 38.

RÁCZKEVY-EÖTVÖS, Á. 2022: Atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj. 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 71 paĝoj.

RÁCZKEVY-EÖTVÖS, Á. 2022: Atributy apoštolů a evangelistů. 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 71 paĝoj.

RÁCZKEVY-EÖTVÖS, Á. 2022: Kristana Kongreso, 16 – 23 julio 2022, Domaszék, Hungario. Dia Regno, 1: 14-16.